061.22(ISAE).055.5„1949"

## ESTRARA RAPORTO PRI 1950.

**La komitato** konsistis el jenaj 13 personoj: S. Alexandersson, Svedujo, F. J. Belinfante, Usono, E. D. Durrant, Britujo, M. Fréchet kaj F. Gaume, Francujo, M. J. de Lange, G. F. Makkink kaj W. P. Roelofs, Nederlando, H. Sirk, Aŭstrujo, C. Støp-Bowitz, Norvegujo, J. Toczyski, Polujo, A. A. M. Whitehead kaj K. Young, Britujo.

**La estraro,** elektita de kaj el la komitato, konsistis el: M. Fréchet, prezidanto; G. F. Makkink kaj C. Støp-Bowitz, vicprezidantoj; E. D. Durrant, ĝenerala sekretario; S. Alexandersson, sekretario-kasisto. Anstataŭantoj estis H. Sirk kaj F. J. Belinfante, kaj revizoroj estis M. J. de Lange kaj K. Young.

**La sekretariejo** troviĝis ĉe la sekretario-kasisto: Inĝ. S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 nb, JOHANNESHOV, Svedujo.

**Delegitoj.** Je la fino de la jaro ISAE havis delegitojn en 22 landoj kaj krome peranton en unu lando.

**Membraro** je la fino de la jaro: Alĝerio 2, Argentino 2, Aŭstrujo 25, Belgujo 3, Brazilo 10, Britujo 89, Bulgarujo 4, Ĉeĥoslovakujo 9, Danujo 12, Finnlando 12, Francujo 73, Germanujo (raporto mankas), Hispanujo 17, Indonezio 2, Italujo 3, Japanujo 32, Jugoslavujo 4, Maroko 1, Meksikio 3, Nederlando 70, Norvegujo 12, Polujo 9, Svedujo 15, Usono 9, sume 418 membroj en 24 landoj (membroj en Germanujo ne enkalkulitaj).

**Scienca Revuo,** oficiala organo de ISAE, aperis per sia dua volumo kun 4 kajeroj kun entute 160 paĝoj, eldonata de s-ro J. Muusses, Nederlando. Redaktoro estis s-ro W. P. Roelofs.

**Statuto.** Oni decidis ŝanĝi parton de la statuto, kiu temas pri Scienca Revuo.

**La kongresa kunveno** okazis la 8 aŭgusto 1950 en la Sorbonne-Universitato, Parizo. La prezidanto prof. M. Fréchet gvidis la kunvenon. Laŭ propono de s-ro G. F. Makkink, Nederlando, oni decidis pretigi plurlingvan propagandilon por uzado dum internaciaj sciencaj konferencoj. La postan tagon okazis neformala diskutkunveno por ISAE-anoj.

**Landaj sekcioj.** En Francujo fondiĝis sekcio de ISAE, kaj ISAE do nun havas sekciojn en tri landoj: Britujo, Francujo, Nederlando.

**Matrikulo** estis en majo pretigata je 600 ekzempleroj kaj dissendata al la membroj. Adresoj de membroj en Britujo kaj Germanujo mankas en ĝi. Krom la adresaro estas faka indekso.

**Propagando.** Laŭ iniciato de la prezidanto ni komencis prepari enketon ĉe nun vivantaj nobelpremiitoj. S-ro G. F. Makkink pretigis manuskripton en esperanto por la plurlingva propagandilo.



**Kontakto kun aliaj organizoj.** Intermédiaire des Recherches Mathematiques (revuo pri matematiko), Francujo, kaj Azienda Autonoma della Stazione di Cura Acqui (kuracloko), Italujo, fariĝis membroj de ISAE.

### Spezoj 1950.

| Enspezoj | sv.kr. | Elspezoj | sv.kr. |
|---|---|---|---|
| Aŭstrujo | 27.20 | Al Muusses | 583.85 |
| Belgujo | 9.02 | Papero, materialo | 96.80 |
| Brazilo | 78.29 | Poŝtmarkoj | 73.15 |
| Britujo (kotizoj 49) | 23.90 | Kotizo al UEA | 14.25 |
| Finnlando | 79.47 | Repago de ŝuldo | 79.38 |
| Francujo | 466.84 | Diverso | 2.95 |
| Hispanujo | 7.25 | En la kaso je la 31/12 | 183.83 |
| Meksikio | 15.68 | | |
| Norvegujo | 73.95 | | |
| Polujo | 113.42 | | |
| Svedujo | 128.89 | | |
| Usono | 10.30 | | |
| Sume sv.kr. | 1034.21 | Sume sv.kr. | 1034.21 |

### Bilanco 31.12.1950.

| Bonhavoj | sv.kr. | Ŝuldoj | sv.kr. |
|---|---|---|---|
| En la kaso | 183.83 | Brazilo | 7.65 |
| Aŭstrujo | 16.35 | Meksikio | 12.10 |
| Tramondo, Aŭstrujo | 30.70 | Muusses | 238.00 |
| Belgujo | 3.35 | Muusses, nepagitaj abonoj | 522.00 |
| Bulgarujo | 29.00 | Polujo | 44.50 |
| Ĉeĥoslovakujo | 155.00 | Svedujo | 7.35 |
| Hanuš, Ĉeĥoslovakujo | 89.00 | Kapitalo | 141.73 |
| Danujo | 23.80 | | |
| Finnlando | 5.55 | | |
| Francujo | 43.50 | | |
| Germanujo | 6.15 | | |
| Hispanujo | 123.00 | | |
| Japanujo | 200.00 | | |
| Jugoslavujo | 26.00 | | |
| UEA | 12.30 | | |
| Usono | 25.80 | | |
| Sume sv.kr. | 973.33 | Sume sv.kr. | 973.33 |

La estraro.